


DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ n-ro 2 (857) ✪ 2006



Pentris: Nabil Ananis
Fotis: Jim Elfström/IKON
ikon@svenskakyrkan.se

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;

☎ +33 (0) 549468021;

✉ keli@chez.com

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4,
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;

☎ +31 1724 20222;

✉ e.a.vandijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;

☎ +49 7131 162688;

✉ SLKrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- ✪ Membro-subtenanto €30,- ✪ Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- ✪ pagante al Libroservo €18,- ✪ Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. ✪ Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI ✪ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Heimdalsvägen 24,
S 149 32 Nynäshamn, Svedio;

☎ +46 (8) 52016816;

✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10

✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;

☎ +420 325 615 651;

✉ Cea.polnicky@quick.cz

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

ENHAVO

Saviga transplantado	27
Tiun tagon ni neniam forgesu	28
Prezentado pri la epistolo al la Galatoj	30
KELI-kongreso, tria listo	34
Ora ringo	35
La profilo – Jacques Tuinder	36
Librorecenzo – Arne la ĉefido	37
Mi estas kiu estas – parto 8	38
La Evangelio Greka laŭ Tomaso	40
Informetoj	46
Nekrologo - Wim Koopmans	47
Multaj la radioj - kanto	48

REDAKTORAJ VORTOJ

Ĉe ni, en norda Eŭropo, la alvenanta printempo, post longa vintro, donas ĝojon kaj esperon kaj ni rimarkas la vivon reveni al la plantoj. Ankaŭ la someraj birdoj venas. Ĉi-foje donante iom da timo, ĉar kelkaj el ili kunportas la “birdan gripon”. La printempo ankaŭ signifas gravajn festojn por ni kredantoj – inter aliaj la pasko. Tio, kio okazis antaŭ 2000 jaroj, influas nin kaj inspiras nin, instigas nin pluendoni kaj helpi aliajn pro tio kion ni mem ricevis – novan vivon kaj vivan riĉecon. La fronta bildo, iom moderna, defias nin. Kion signifas la krucumo hodiaŭ – por mi, por miaj rilatoj al aliuloj?

Cetere mi volas danki al ĉiuj kontribuantoj al nia revuo. Ĉiam estas granda ĝojo prilabori kaj enmeti viajn tekstojn. Feliĉan Paskon!

Saviga transplantado

Artikolo de la hungara reformita pastoro, József FARKAS

Tradukis Éva Farkas, HU

Nia tasko estas anonci la Evangelion el la tuta Biblio kaj ene de tio, ĉefe el la morto kaj resurekto de Jesuo Kristo. – Kial ĝuste el lia morto kaj resurekto? Ja ankaŭ liaj instruoj kaj liaj bonagoj estas tiel belaj kaj veraj, se ni serioze konsiderus ilin, resaniĝus pere de ili la tuta mondo. El inter la multaj, konataj kaj gravaj respondoj nun eksonu ĉi tie du malpli konataj pensoj:

1. La historio de Jesuo tial devis disvolviĝi ĝuste tiel, por ke evidentiĝu, ke la Dia vivo ne estas "vivofremda" al la homo. La homa korpo ekzisto povas esti konvena ujo de la Dia enhavo. La granda venko de la medicina scienco – la transplantado de organo – helpas kompreni ĉi tiun veron. La malsana organismo ĝenerale protestas kontraŭ la organo prenita el la korpo de alia homo (koro, reno, ktp.). Ĝi volas elĵeti ĝin el si mem, kvankam ĝuste ties akcepto ebligas la pluvivadon. Sed tio ne estas "vivofremda", kaj se ĉio iras bone, la organismo fine akceptas la novan organon. Laŭ la instruo de la Biblio la pekulo ĝenerale protestas kontraŭ la akcepto, – la "transplantado" de la Dia naturo. Sed tio ne pruvas, ke la "Dia enhavo" estus vivofremda por la "homa ujo". La tuta surtera ekzistado de Jesuo la Nazaretano pruvas la interakordeblon de la homo kun Dio! Jesuo

Kristo estis vera homo, en ĉio simila al ni (Heb 4:15) kaj en tiu lia ekzisto li estis konvena ke "en li korpe loĝas la tuta pleneco de la Dieco" (Kol 2:9).

Ankaŭ nia korpo estas konvena (taŭga) por fariĝi "Dia ujo", "templo de la Sankta Spirito" (1. Kor 6:19). Se ne sukcesas la enplantado de la vivo de Kristo en nin, se nia korpo kaj animo elĵetas el si ĉi tiun vivsavan, beatigan helpon, tial ne respondecas nia "homa-strukturo", sed la peko, reganta en ni. La historio de Jesuo konvinke pruvas la proksiman "parencecon" inter Dio kaj la homo.

2. Sed la sama historio – kaj nun ni pensu pri la glora daŭrigo, la resurekto – ankaŭ tion pruvas, ke la "Dia enhavo", kiu aperis en la homa ujo de Jesuo la Nazaretano, ne estas nepre ligita al la surtera homa korpo. En Pasko evidentiĝis ke ankaŭ sen la Jesuo-korpo vivas kaj agadas la reala Kristo, kiu kaŝiĝis en li. Ĉi tie nun ni estas jam ĉe la sojlo de tia mistero, kie jam haltas nia pensado de materio ligita. – Nur tion ni perceptas, ke la senŝanĝa Kristo-realaĵo aperis antaŭ la disĉiploj en nova spirita "korpo", kiun nia intelekto ne povas difini. "La nuna homo estas el tero, elpolva, la dua homo estas el la ĉielo" (1. Kor 15:47). Jesuo Kristo, kiu vivis inter ni en la formo de la "unua homo" – en Pasko

aperis kiel "dua homo el la ĉielo". La entenanta "ujo" ŝanĝiĝis, sed la originala enhavo restis la sama.

Laŭ nia kredo tio estas la vero. Tial ni ne povas akcepti, ke en la morto ni definitive neniigos. Sed ankaŭ tiun instruon ni ne akceptas, ke post la morto laŭ longa vojo de la transmigrado de la animoj "perfektiĝinte" nia individua vivo fine ensolviĝos en la grandan "Ĉion" resp. en la grandan "Unuon".

La detalojn nun ni ne komprenas – "ĉar nun ni vidas per spegulo, malhele" (1.Kor 13:12). Sed tion klare diras la Mesaĝo, ke ankaŭ post nia vivo ni havos vivon, kaj tiu vivo ankaŭ plue estos nia vivo. Tiu vivo, kiu nuntempe funkcias en la nuna formo kaj spirito, tiu daŭros plu en la graco-plena ĉiela mondo "okulon ĉe okulo".

Pri tio pensante ni devas "kalkuli niajn tagojn" (Psa 90:12). ☩



Ĉiuare Amnestio Internacia, la mond-vasta organizaĵo batalanta por viktimoj de malrespekto al homaj rajtoj, lanĉas kampanjon kiu rezultigu la liberigon de unu aŭ pluraj prokonsciencaj, sekve senkulpaj, prizonuloj. En mia loĝloko Amnestianoj la 10-an de decembro 2005, Tagon de Homaj Rajtoj, okazigis marŝon tra la centro de la vilaĝo, kiun partoprenis multaj civitanoj, provizitaj per tekstukoj kaj torĉoj. Dum ili pace iradis tamburoj kaj preĝejaj sonoriloj solene kaj klare muzikis lingvon de 'ni danku kaj neforgesu!' en la silentaj stratoj kaj placoj.

Komence de la cerebro, kiel kutime, parolis la vilaĝestro substrekante la signifon de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝian benon. "Ekzistas landoj, en kiuj oni senkaŭze enkarcerigas homojn.

de Jacques TUINDER, NL

**TIUN
TAGON NI
NENIAM FORGESU!**

Aŭ ankoraŭ pli grave: en kiuj simple malaperas civitanoj neniam revenontaj (...). Ankaŭ Nederlando suferis dum la Dua Mondmilito sub faŝisma reĝimo. Ankaŭ en nia nuna vilaĝo tiam ne funkciis homaj rajtoj; tiutempe povis okazi ke la okupinto arestis judojn kaj mortpafis tiujn, kiuj kontraŭis kaj rezistadis. Tiam estis afero de internacia solidareco ne rezignacii. Danke al la preteco de homoj, kiuj volis batali por libera demokrata mondo, ripariĝis la homaj rajtoj en nia parto de Eŭropo kaj povis reviviĝi la demokratio. Tio devi-

gas nin al solidareco kun homoj, kiuj nuntempe en prizonoj troviĝas kaj torturigas en landoj kun teruraj reĝimoj." Helpo al tiuj prizonuloj estas efika pere de la agadoj de Amnestio Internacia. La vilaĝestro emfazis ankaŭ la rajton kiun ĉiu havas libere esprimi sian opinion, sed necesas konscii pri la limoj, kiujn indikas la libereco kaj konvinko de kuncivitano!

Eble ĉar mi estas dekomenca membro de Amnestio oni invitis min peti atenton pri viktimo en Sudano, lando kiun jam longe skurĝas milito. Inter 1972 kaj 1983 regis paco, sed cetere ekde la Tago de Sendependeco (1954) furiozis milito inter la Nordo kaj la Sudo. La ĉefajn partiojn mi menciis: unuflanke batalas la registaraj trupoj kaj la paramilitistoj (= la Nordo) kaj aliflanke la Sudana Popolliberiga Armeo (la Sudo). En januaro 2005 oni subskribis pac-interkonsenton, kiu difinis ke la Sudo havu aŭtonoman statuson dum la ses venontaj jaroj. Poste la enloĝantoj referendumo balotos pri sendependeco.

En februaro 2003 estiĝis krome batalado en la okcidenta regiono Darfur. Dekmiloj trovis la morton kaj milionoj forfuĝis. Multegaj el ili 'amasbivakas' plej nehominde en- aŭ eksterlande. La registaro havas la eblecon aresti homojn por nedifinita tempo sen kulpigo aŭ proceso, kelkfoje sen iu kontakto kun la ekstera mondo. Prefere oni kaptas juristojn kaj aktivistojn por homaj rajtoj.

Amnestio nun agadas favore al Babiker Mohamed Abdallah Atim, ad-

vokato kiu asistis homojn, kiujn oni en Darfur enkarcerigis kaj torturis. Ĉi tiu Fur, ano de etna grupo el Suda Darfur estis arestita la 10-an de februaro 2004 fare de membroj de la Sekureca Servo, kiam li promenis sur la vendoplaco. Ĝis nun oni ne oficiale kulpigis lin, kaj lia afero ankoraŭ ne estis antaŭ tribunaloj juĝistoj. Eble oni suspektas lin esti ano de la Popolliberiga Armeo.

Atim estas edziĝinta kaj ne havas infanojn. Oni permesis al li viziti sian edzinon unufoje dum duona horo; tio okazis en marto 2005. Ne estas certe kie li nun troviĝas, ĉar oni ade kaj ade translokas lin. Amnestio ricevis sciigojn pri tio ke oni torturas lin. Al Observantoj de la Unuiĝintaj Nacioj oni ne donas permeson viziti tiujn centrojn.

Laste, ni aŭdas pri zorgoj koncerne la sanstaton de Atim. Li suferas de iktero kaj malbone funkcia stomako. Oni jes permesis al li kelkfoje konsulti kuracistojn en hospitalo.

Esperantistoj kaj neesperantistoj povas eble helpi al Atim anglalingve skribonte leteron al Sudan Bar Association, S-ro Fathi Khalil, P.O. Box 1954, KHARTOUM, Sudan. Vi komprenu, ke Atim estas membro de ĉi tiu Asocio. Kiam li iam liberiĝos ni povos paroli pri denova tago, kiun ni ne forgesu! ☺



Amnesty International

Prezentado pri la epistolo al la Galatoj

Prelego en Piliscsaba, 18/07/2005 – fina parto

Ĉapitroj 5 kaj 6

Philippe COUSSON, FR

Por libereco Kristo nin liberigis; tial staru fortike, kaj ne reimplikiĝu en jugon de sklaveco. 2 Jen mi, Paŭlo, diras al vi, ke, se vi cirkumcidiĝos, Kristo al vi tute ne utilos. 3 Mi denove atestas al ĉiu homo cirkumcidata, ke li estas ŝuldanto, por plenumi la tutan leĝon. 4 Vi, kiuj volas vin pravigi per la leĝo, apartiĝis for de Kristo; vi forĵalis de graco. 5 Ĉar ni en la Spirito atendas la esperon de justeco per la fido. 6 Ĉar en Kristo Jesuo nek cirkumcido nek necirkumcido valoras ion, sed nur fido, energianta per amo. 7 Vi bone kuradis; kiu vin malhelpis, ke vi ne obeu la veron? 8 Ĉi tiu influo ne venas de tiu, kiu vin vokas. 9 Malmulto da fermentaĵo fermentigas la tutan mason. 10 Mi fidas pri vi en la Sinjoro, ke vi ne alie sentados; sed tiu, kiu malkvietigas vin, elportos sian propran jugon, kiu ajn li estas.

Gal 5:1-10

Galatoj 5:1-26

Poste venas la 5a ĉapitro, kies unua versiklo servas kiel moto por la kongreso. Tiu ĉapitro do ĉefe celas la liberecon.

Tiun liberecon Paŭlo prezentas kontraste al du ideoj, du ideoj komplete kontraŭdiraj kun la nova vivo ricevita de la graco, de la releviĝo.

El la unua parto, li kontraŭmetas la liberecon donitan de la Evangelio, al kiu vokas la Evangelio, kaj la furiozan provon obei la leĝon, submetiĝi al la leĝo.

Kaj en la dua parto, li kontraŭmetas la liberecon kaj la satigon de la karnaj deziroj.

Se oni povas facile kompreni ke sankta vivo, tia kia devas esti kredanta vivo, ĉu ne, ke sankta vivo estas ne-

akordigebla kun satigo de karnaj deziroj, oni malpli facile komprenas ke la respekto de la leĝo, ke la submetiĝo al la volo de Dio, povas esti priskribita kiel mala al la Evangelio.

Por aludi ĉiujn ordonojn, Paŭlo utiligas la bildon de la cirkumcido, al kiu la judismemaj kredantoj volis submeti la nejudajn kredantojn. Por Paŭlo, komenci ĉe la cirkumcido, tio signifas enmeti la fingron en la radoaron, kaj sin devontigi plenumi la tutan restaĵon de la leĝo. Kial efektive oni restus ĉe la cirkumcido? Nu, la fido en la morto kaj la releviĝo de Jesuo Kristo ne postulas cirkumcidon, nek formalan obeon al la ordonoj, sed alvokas al vivo de amo, per la Spirito en espero de la justeco.

Tamen, por kelkaj, estis skandalo, ke la savo estas donacita sen esti meritita. Sed tio estas la graco de Dio. Dio rigardas nin tra la morto kaj la releviĝo de Sia Filo. Se ni tamen serĉas akumuli bonajn poentojn, tio signifas, ke tio, kion Jesuo faris estas senvalora, aŭ almenaŭ ne sufiĉa. Tiam, la graco ne povas aplikigi, pro nia decido kaj provoj mem.

Poste, Paŭlo iras al la dua punkto. Se ne plu estas reguloj, ni vivu sen reguloj, ni vivu senregulan vivon. Sed ĉi tie ankaŭ Paŭlo diras: Halte. Ne pro tio, ke oni ne devas submetiĝi daŭre al ordonoj de la leĝo, oni devus submetiĝi al la ordonoj de la propra plezuro. La deziroj de la karno, la deziroj de satigo de ĉiuj niaj deziroj, de niaj fantasmaj, same certe malproksimigas nin de la Evangelio, kiel la provoj obei la leĝon. En ambaŭ kazoj, la centro de la vivo estas MI. Ĉu mi submetiĝas, provas obei, aŭ ĉu mi lasas min, mi ĉiamaniere pensas pri mi, pri la satigo de mia mio, de mia karno, de mia ventro, de mia reputacio, de mia pozicio. Tiam estas for Kristo. Kaj Dio eĉ pli. Kaj pri la alia homo mi eĉ ne parolas.

Kie tiam estas la espero de la justeco? Kie estas la aganta fido per amo? Ĉar jen la ŝlosilo de tiu ĉi ĉapitro, amo.

Lasi la Spiriton konduki nian vivon, ne estas reciti receptojn por feliĉa vivo, ne estas apliki neerareblan metodon por sukcesa vivo, sed estas movi la gravito-centron de la propra vivo al Dio kaj al la proksimulo, estas meti en ili nian celon, nian vivmotivon.

Paŭlo uzas en tiu peco du radikojn,

kiuj povas klarigi tian vivon. Temas pri la vortoj **gloro** kaj **justeco**. La vorto gloro troviĝas en la esprimo tradukita per "fanfaronema" en versiklo 26, kaj justeco troviĝas en versiklo 5.

Etimologie, la gloro estas la pezo, la

Gloro kaj justeco

- 26 Ni ne fariĝu fanfaronemaj, incitante kaj enviante unu la alian.
- 26 μη γινωμεθα κενοδοξοι αλληλους προκαλουμενοι αλληλοις φθονουντες
- 5 Ĉar ni en la Spirito atendas la esperon de justeco per la fido.
- 5 ημεις γαρ πνευματι εκ πιστεως ελπιδα δικαιοσυνης απεκδεχομεθα

pezo kiun oni volas doni al iu, aŭ al la propra vivo. Paŭlo petas de ni ne serĉi vanan gloron. La gloro ne estas nia, kaj ni scias, ke nia vivo certe ne estas glora. La gloro estas Dia, nur Dia, diris la Reformatoroj. Kio devas pezi, kio devas valori en nia vivo, tio estas Dio. Serĉi personan gloron en io ajn estas same vana kiel stulta. Ni ĉion ricevis de Dio.

La justeco ne estas tio, kion ni meritus, ĉu mi, ĉu vi, ĉu iu ajn. La justeco, tiu de Dio, estas la justeco, tia kia Li vidas. Kaj Dio vidas nin tra Sia Filo, tra Sia Filo mortinta kaj releviĝinta. Tial Li rigardas nin kiel justaj, ĉar ni per la fido metas nin je la profito de la savo per graco, pro Jesuo Kristo. Dio ne librote-nas pri ni, pri tio kion ni sukcesus aŭ malsukcesus.

La justeco estas tio, kion ni aplikas amante Dion kaj nian proksimulon. Por ni, la justeco ne estas tiu kiu parolas pri ni, ĝi estas tiu kiu parolas pri la alia, kiu igas nin ami la alian, kiu igas nin rigardi

la alian kiel Dio rigardas lin. Ĝi estas tiu, kiu igas nin doni al la alia pezon. Ne pro tio, ke la alia estus peceto de Dio, aŭ la vizaĝo de Dio, sed ĉar li estas ankaŭ amata de Dio.

Galatoj 6:1-18

Pri tiu rilato al aliaj parolas ankaŭ la lasta ĉapitro de la epistolo.

Tiu ĉi ĉapitro estas konstruita, kiel multaj tekstoj en la Nova Testamento en sinsekvaj ingecoj. La nomo estas kiasmo.

Jene:

- ◆ versikloj 1 & 2: kuraĝigoj
- ◆ versikloj 3–5: atentu pri la motivoj
- ◆ versiklo 6: divido
- ◆ versikloj 7–9: semado kaj rikolto
- ◆ versiklo 10: divido (denove)
- ◆ versiklo 11: Mi estas tiu, kiu skribas, diras Paŭlo
- ◆ versikloj 12 & 13: atentu pri la motivoj (denove)
- ◆ versikloj 14–18: kuraĝigoj (denove)

En tiu ĉi ĉapitro Paŭlo volas esplori pri la motivoj de tiuj, kiuj volas devigi la kristanojn plenumi la ordonojn de la mosea leĝo. Kaj li do volas indiki kiamaniere devus kondukti la fidelaj animzorgantoj, fakte, kiel vi konstatos, ĉiuj kristanoj.

Kiel dirite en la antaŭa ĉapitro, unu el tiuj motivoj de tiuj postulemaj kristanoj estas fakte la propra gloro. Al tiu aspekto volas respondi Paŭlo nun. Li kontraŭmetas al tiu sinteno la sintenon de la "spirita" respondeculo. Sed fine de la ĉapitro, li diras ke ĉiuj kredantoj estas vokitaj fariĝi tiuj "spiritaj" re-

spondeculoj.

Dum sia tuta predikado, Paŭlo admonis tiujn, kiuj volis kompletigi la Evangelion, kiuj donis ordonojn kaj instrukciojn al tiuj, kiuj laŭ ili ne estis "kompletaj", al tiuj kiuj malhavis ion, la mosean leĝon. Kaj li faras ĉi tie kontraŭproponon alternativan konduton. Se okaze vi trovas vian fraton en eraro, en malfacilaĵo, ne riproĉu lin forte, sed iru al li kun mildeco. relevu lin, restarigu lin, ne premu lin. Vi estas miaj fratoj, ankaŭ li estas tia.

Paŭlo insistas. Se vin tentas la ideo, ke vi valoras ion, ion eble gravan, fakte vi valoras nenion de vi mem. Neniu revo pri grandeco ene de la eklezio. Nur servado.

Kaj li denove insistas: se gloro por vi eblas, certe ne estas pro iu alia. Ĉar ĉiu respondecas pri si mem. Same kiel ne eblas diri ke "mi ne kulpas, sed tiu alia", same ne eblas doni al si meriton pro tio kion faras iu alia. La pezo de mia situacio rigardas min. Estas afero inter mi kaj mia Dio. Se la fratoj dividas kun mi la ŝarĝon, kiam ĝi estas tro peza, ili ne ricevas meriton pro tio. Rememoru la frazon: Vi estas senutilaj servistoj, vi faris tion, kion vi devis fari.

La kristana komunumo devas esti komunumo, estas komunumo. Ĝi dividas, kaj tion kio iras bone, kaj tion kio iras malbone, kaj ankaŭ la instruadon de la Parolo, kaj ankaŭ la subtenon al tiu kiu instruas.

Ni jam troviĝas je versiklo 7, kaj tie troviĝas la kerno de tiu peco, la nodo de la motivo de la kristanaj agadoj.

En kazo de forgeso, Paŭlo rememo-

rigas nin, ke Dio ne povas esti trompita, pri tio kio agigas nin. Li rememorigas ke ni ekhavos tion kion ni volas, aŭ pli ĝuste, ke la fruktoj de nia laboro estas tiaj, kiaj estas iliaj motivoj.

Se nia celo estas por la hodiaŭa tempo, ĝi pereos, kiel la tempo pasanta, kiel ni mem. Kion ni rikoltos vidos foruziĝon kaj putriĝon.

Se nia celo estas spirita, ĝi ne plu koncernas la nunan tempon, nek nian personon, tiam ĝi koncernas alian tempon, la eternan vivon. Kaj notinde estas, ke Paŭlo uzas alian vorton por la tempo, kiun oni povus pensi neakordigebla kun la eterna vivo, kairios, la nuna tempo, la okazo, la ĝusta momento. Do, fakte, la tempo por prepari la eternan vivon, la tempo por la bono, la tempo por la aliaj, estas la nuna tempo, estas la okazo kiu troviĝas nune antaŭ ni. Neniu kalkulo por posta tempo, kie la profitoj de niaj agadoj povus utili al ni. Neniu planado por la aganta amo. Estas la nuna tempo por la eterna vivo.

Kaj, ĉar tio gravas, Paŭlo insistas, ke li mem skribas.

Kaj li rekomencas, kion li diris en la komenco.

Tiuj, kiuj volas cirkumcidi vin, havas efektive kiel celon nur materiajn aferojn, nome esti agnoskitaj kiel bonaj, kiel tiuj kiuj sukcesis submeti vin, kaj tio povus eĉ eviti al ili la persekuton. Eĉ se ili ne komplete plenumas la leĝon, ke vi submetiĝas al la leĝo pri cirkumcido signifas ke tio gravas por ili, kaj via submetiĝo estas ilia venko, ilia gloro.

Sed, estas ĉi tiu kruco, kies malavantagojn ili volas eviti, ekzemple la perse-

kuton, estas ĉi tiu kruco kiu estas por Paŭlo la sola glorkialo, lia sola motivo por agadi. Nenio, kio koncernas la mondon kaj ĝiajn putreblajn avantaĝojn, ĝiajn foruzeblajn interezojn, nenio valoras.

Kio valoras, devas esti nova kreitaĵo. Vivi en la nuna tempo tiun realaĵon por la eterna vivo, tio estas la regulo, la leĝo de Kristo. Tio estas la vera leĝo, ne la cirkumcido, ne la submetiĝo al fratoj.

Anstataŭ aldoni ŝarĝon al la dorso de via frato, subtenu lin, helpu lin. Anstataŭ pensi pri via gloro, pri via valoro, tio estas pri via graveco, pensu al la kruco de Kristo, kiu ĉion portis por vi, kaj tiam vi povos porti vian fraton.

Vi povas porti la ĉagrenon de via frato, sed ne ĉagrenigu lin, kiel faris la Galatoj al Paŭlo.

Jen denove la vorto "porti". Paŭlo portas la signojn, la markojn de Jesuo. Paŭlo suferis persekutojn. Li ne provis eviti ilin. La markoj, kiujn li havas sur sia korpo estas ankaŭ la markoj, kiujn portis la sklavo. Paŭlo kiam li uzas tiun ĉi vorton indikas ke li estas sklavo de Kristo.

Paŭlo finas per bendiro, kiu alvokas la gracon de Jesuo Kristo, nia Sinjoro, super nin kaj nian spiriton, ĉar ni estas spiritaj.

En ĉi tiu epistolo ne troviĝas metodo por kuraci problemojn ene de kristana komunumo. En ĉi tiu epistolo ne troviĝas difino pri libereco. Sed Paŭlo finas per la sola motivo kiu devas konduki kristanojn: la gloro de Dio. ☩

KRISTANA KONGRESO

(56-a kongreso de KELI)

12. – 19. 8. 2006 STRÁŽNÉ, Ĉeĥio

Ni sincere invitas Vin partopreni nian KELI-kongreson en
“HORSKÝ DOMOV” en montara vilaĝo STRÁŽNÉ (Ĉeĥio).

Pri la kongreso vi informiĝu ĉe:

Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio

Telefono kun faksilo: +420 325 615 651

E-mail: cea.polnicky@quick.cz

Aliĝkosto

post 1.4.2006

Kategorio A : € 30

Kategorio B : € 50

Restadkosto

€ 110

€ 220 (270)*

Rimarku: Sumoj en EUroj

* unulita ĉambro

Kategorio A: ekssocialismaj landoj, Afriko, Sudameriko

Kategorio B: ĉiuj aliaj landoj



Daŭriga listo de partoprenontoj de la 2006-jara KELI-kongreso en Ĉeĥio

35.	S-ino	Stroinski, Monika	Germanio
36.	S-ro	Stroinski, Hieronymus	Germanio
37.	S-ro	Leuze, Ernst	Germanio
38.	S-ino	Landfors, Anna	Svedio
39.	S-ro	Landfors, Mats	Svedio
40.	S-ino	Czirn-Terpitz, Helga	Germanio
41.	S-ino	Udalova, Irina	Rusio
42.	S-ro	Schaeffer, Karl Heinz	Germanio
43.	S-ro	Polnický, Tomáš	Ĉeĥio

Ora ringo

Mu Binghua, Ĉinio

Eta Hong, pro kio vi revenis hejmen en tiel malfrua horo? Pro tio mi estas tre maltrankvila.”

Apenaŭ li finis siajn vortojn, li vidis la edzinon trista. Nu, li haste ŝanĝis sian tonon. ”Ni kune manĝu vespermanĝon, kaj post tio ni iru al la dancejo nin distri, ĉu bone?”

Ŝi respondis nenion. En la momento regis granda silento. Sed ŝi jam faris profundan veon, tuj post kiam ŝi peze ĵetis sin sur la sofon.

”Ĉu vi malsaniĝis, eta Hong?” li demandis ree sed ŝi kapneis senvorte. ”Ĉu iu vin riproĉis?” Ŝi neis denove per la kapo. ”Do, pro kia kaŭzo vi estas tiel malĝoja?”

”Perdiĝis la ora ringo donacita de vi.”

”Kio!?” Li ekrigardis en la direkto al ŝi je la maldekstra mano. Ĉe tio lia vizaĝo misformiĝis, kaj ankaŭ liaj okuloj malfermiĝis ronde. ”Kiel vi ĝin perdis? Kiam kaj kie?”

”Post la labordeĵoro mi iris bani min. Baniĝinte, mi trovis, ke la ringo jam malaperis. Mi senprokraste serĉis ĝin ĉie en la laborejo kaj en la banĉambro, sed mi ĝin ne retrovis, ...”

”Oho! Jen vi havas! Vi ĉiam preteratentas viajn proprajojn, aparte tiujn donacitajn de mi.”

”Mi sentas doloron en la kapo, ... ankaŭ mia koro estas suferanta.”

”Tamen via sufero ne helpas nin. Ĉu ni povas trovi la ringon dank'al via

sufero? Efektive vi vere estas tia virino, kiu estas malordemulino!”

Ili iĝis geedzoparo nur antaŭ iom pli ol unu monato. Nun al ili okazis la unua kverelo. Kun la videbla kolero li pafis sin eksteren de la pordo. Ŝi senforte kuŝiĝis en la liton kaj tiam ekmemoris pri tio, ke dum ili estis en la arda amo, li faris al ŝi la ĵurligon: ”Por vi mi eĉ kuraĝos suprengrimpi glav-monton kaj malsupreninri fajr-maron. Por vi mi povas forlasi honoron, noblecon kaj riĉecon.” Kaj ŝi komencis mallaŭte ploreti.

Vespere de la dua tago ŝi revenis de la laborejo. Ŝin vidinte, la edzo diris al ŝi glacie: ”Ve al vi! Mi asertas,

ke la ringo ne estas retrovita.”

”Jes, mi ĝin ricevis. La deĵoranto en la banĉambro ĝin trovis, kiam li purigis la banujon. Poste li transdonis ĝin al mi.”

Li tuj kaptis ŝin je la maldekstra mano kaj atente observante ĝin, li montris sian kontenton per rideto.

”Ĉi-vespere ni aldonu du bongustajn pladojn al la manĝo. Ni iom trinku ankaŭ kune. Kaj post tio ni iru danci.”

”Forte min doloras la kapo, mi ne volas eliri kune kun vi.”

Sed ŝi klare sciis en la koro, ke ŝia kapo ne estas dolora, kaj ke nur ĉar en liaj okuloj la ringo estas pli kara ol ilia amo, tial ŝi rifuzis akompani lin je preteksto de la doloro de la kapo. ☪



Ofte homoj al mi demandas, kiam mi naskiĝis. Tiam kutima mia respondo tekstas: 'en fifama jaro'. Miaj karaj gepatroj, tiam loĝantaj en Hago, kuŝigis min en bonvenigan lulilon en 1933. Ili donis la vivon al dek infanoj, kiujn ili devis eduki en grandparte malfacila periodo, kiun karakterizis mizero kaj malriĉo. La Dua Mondmilito ege influis min kiel junan knabon, precipe kiam miaj ekvidantaj okuloj estis atestantoj pri la terura incendio trafinta la koron de Roterdamo (majo 1940). Ĝi faris multege da viktimoj, kaj kiel sepjara junulo mi jam venis al la konkludo: "Milito estas krimo, milito estas frenezo!" Ekde tiu momento mi eble ekfariĝis 'porpaca apostoleto',

kaj tiun konvinkon ade plifortigis mia konatiĝo kun Esperanto kaj ĝia movado.

Nia kara d-ro L.L. Zamenhof havis analogan intuicion, kiam li aĝis kvin jarojn kaj alrigardis la pogromojn kaj sango-elverŝadon inter la diversaj gentoj. Tio kondukis al firma intenco, kiu ne forlasis lin dum la tuta vivo. En ĝia centro simbole staris 'altaro'.

Mi sincere kaj varme dankas al la ĉielo, kiu donis al mi bonajn gepatrojn. Ili estis religiemaj, sed en sencio tre praktika. Ili instruis al mi konkrete kaj konsekvence la ĉiutagan vojon, kiun iradis Kristo.

Kiam mia patrino naskis la lastan infanon, ŝin kaj la frateton prizorgis juna

flegistino, kiu en sia teko havis lernolibron de... nia kara Esperanto. Naŭ tagoj por mi sufiĉis por baze alproprigi al mi tiun belan lingvon, kiu konigis al mi 'la Majstron' (flanke de Majstro Jesuo, kiu cetere same naskiĝis el juda patrino!).

Al Esperanto mi dankas mian karan edzinon Vera, kiun mi ekkonis kadre de la Universala Kongreso en Varsovio (1959). Kun ŝi, profesie familia flegistino, mi fondis ĉarman familion tri-infanan.

Fininte la mezlernejon mi kelkajn jarojn administracie laboris en transporta entrepreno. Iom post iom mi decidis studi klasikajn lingvojn, filozofion kaj teologion, ĉar mi deziris fariĝi misiisto. Poste mi ekkomprenis, ke tio ne estas mia vojo; mi aliĝis al Sociala Akademio pro tio ke allogis min la profesio de social-helpisto. Dum mia 'aktiva' vivo mi laboris en maljunulejo, komunuma social-servo, inter-eklezia instituto por familia helpo, malliberejoj kaj hospitalo.

En 1966 mi eksciis pri la giganta problemo de nenecesa vidhandikapeco: resume, tri el kvar blinduloj estas tute senbezzone tiaj. Do jam kvar jardekojn mi - en libera tempo kaj je propra poŝo - energie klopodas, kun modesta helpo de esperantistoj, doni lumon al malriĉaj homoj kun vido-problemoj. Ĉiu KELI-ano pri tio estas bonege informita.

Absoluta kulmino en mia vivo esperantista nepris la unua komuna kongreso en Limburg/Lahn (1968). En tiuj tagoj mi estis IKUE-prezidanto, dum pastro Adolf Burkhardt patris la KELI-familion. Elstare funkciis Esperanto kiel ekumena lingvo. Ni vivis en la tagoj de



la Dua Vatikana Koncilio, kaj grandaj, esperoplenaj estis atendoj de kristanoj diverskonfesiaj.

Bedaŭrinde nia amata papo Johano XXIII tro frue forlasis la teran vivon,

kunpreninte kun si siajn ideojn kaj revojn. Kiam Vera kaj mi en Kiljava (1969) ĉeestis la KELI-kongreson kaj partoprenis la sanktan manĝon, multaj niaj katolikaj gefratoj akre protestis kaj forte riproĉis nin; ili ne permesis al ni sekvi nian konsciencon, kiu diktis al ni ke estas Jesuo mem kiu invite vokas siajn geamikojn al la eŭkaristia tablo.

Jam dum longa tempo mi estas estrarano de nia kara KELI, eĉ ĝia prezidinto. Por mi ĉiujare estas ĝojo kaj

ĝuo partopreni ĉu KELI-konferencon ĉu tutkristanan kongreson.

En 1994 mi pensiiĝis, kaj de tiu tempo mi volontulas en benediktana abatejo kaj en bonfarprojekta revendejo. En ambaŭ lokoj mi ricevas multe da financa subteno por realigi iniciatojn de Fondaĵo Evidente. En marto mi esperas komenci trian mision en Rumanio, en majo por la dua fojo flugi Taĝikion, ĉiam kun okulspecialistoj.

Resume, mi sentas min homo benita kaj privilegiita. Multajn el vi mi esperas revidi en Ĉeĥio, kie frato Pavel preparas por nia eta KELI-familio denovan kongreson. Ke li plene sukcesu en tio!

Vere, mi ne povus imagi al mi mian vivon sen Esperanto, sen KELI, sen IKUE kaj sen esperantistoj. "Nia diligenta kolegaro" helpas al mia koro vigligi "la belan sonĝon de l' homaro", esperon pri nova ĉielo kaj nova tero... ☞

Pri la libro

Arne, la ĉefido


Rakonto el la vikinga epoko de Leif NORDENSTORM.
KAVA-PECH. Dobřichovice. 2005. 112 paĝoj.

Ĉarma libro pri la vivo en apudmara vilaĝo de la sveda vikinga tempo. Arne kaj la sklava bubo Trumbe estas la roluloj ĉirkaŭ kiuj la rakonto sin movas, sed krome la scenejon plenigas gekamaradoj, parencoj kaj aliaj. Eĉ Ansgar kaj Vitmar mallonge aperas, survoje al Birka.

La verkisto jam indikis ke estas romano por 8-14-jaruloj, sed mi opinias ke ĝi legindas al ĉiuj. Per dekunu ĉapitroj sur 110 paĝoj ni povas sekvi vere intereskaptan historion, ne nur pri la junuloj sed pri multaj aspektoj de tia praa vivo, ĉiutagaĵoj kaj aventuroj varias. Ĉion vigligas dialogoj kaj interparoloj. La lingvo estas simple klara sed kun riĉa vortenhavo, tiel ke lingve nespertaj povas konsiderinde progresi. Formu studcirklo(et)on!

Ĉio tio aperas en praktika poŝformato kaj spritaj ilustraĵoj de Pavel RAK pliĝojigas la legadon. La eldonejon Kava-Pech por tre bela finformado gratulas

Åke AHLRÉN



MI ESTAS KIU ESTAS – PARTO 8

MI ESTAS LA VERA VINARBO (Joh 15:1-8)

pastoro Bayo AFOLARANMI

Mi estas la vera vinberarbo, kaj mia Patro estas la kultivisto. Ĉiun nefruktodonan branĉon en mi Li forprenas; kaj ĉiun fruktodonan branĉon Li purigas, por ke ĝi donu pli da frukto. Jam vi estas puraj pro la vorto, kiun mi parolis al vi. Restadu en mi, kaj mi en vi. Kiel la branĉo ne povas de si mem doni frukton, se ĝi ne restas en la vinberarbo, tiel ankaŭ vi ne povas, se vi ne restas en mi.

Joh 15:1-4

Enkonduko

Ĉi tiu estas la lasta parto de nia studo pri la grandaj “MI ESTAS–diraĵoj” de nia Sinjoro Jesuo Kristo. La studo pruvigis la diecon de Jesuo Kristo prezentante Lin kiel la Panon de vivo, la Lumon de la mondo, la Pardon (por la ŝafaro), la Bonan Paŝtiston, la Reveliĝon kaj la Vivon, kaj la ununuran veran vivan Vojon. Je ĉi tiu lasta parto, Li estos prezentita kiel la vera Vinberarbo.

Ĉi tiu “MI ESTAS–diraĵo” estas la dua alparolita ekskluzive al la disĉiploj dum la lasta vespermanĝo de Jesuo Kristo en la supra ĉambro. Tamen, kelkaj kleruloj de la Biblio opinias ke Jesuo Kristo diris ĝin en la templo kie estis ora vinberarbo simbolante la vivon de Izraelo kiel la vinberarbon de Dio.

La deklaro

(versikloj 1, 5)

Malsame al la aliaj “MI ESTAS–diraĵoj” kiuj estis antaŭvenitaj per evento aŭ dialogo, ĉi tiu “MI ESTAS–diraĵo” antaŭvenis la paroladon de Jesuo Kristo pri la sekreto por produkti frukton por Li. Li ĵus deklaris: *mi estas la vera vinberarbo* (versikloj 1, 5). La Malnova Testamento aludis al la popolo Izraela kiel al la vinberarbo de Dio (Psa 80:8–16; Jes 5:1–7; Jer 2:21). Tamen, ili trompis la esperon de Dio ne produktante la deziritan bonan frukton. Ili fariĝis sovaĝa vinberarbo. Tial Jesuo Kristo aludis al Si mem kiel al la vera Vinberarbo ĉar Li plenumis la volon de Sia Patro, kaj Lia persona vivo atestis tion.

Kio estis la sekreto? Dio, la Kultivisto estris ĉion kion Li faris. Vinberarbo estas la ordinara vinberplanto kiu estas maldika kaj trenas sur la tero aŭ surgrimpas subtenaĵojn. Ĝi estas unu el la eminentaj plantoj en Palestino. Vi povas kompari ĝin al iu eminenta arbo en via ĉirkaŭo. En versiklo 5, Jesuo Kristo aludis al ni kiel la branĉoj de la vinberarbo. Branĉo ne povas ekzisti sola. Por travivi ĝi devas resti ligita al la planto. Ĝia ĉefa celo estas produkti fruktojn.

Niaj respondecoj kiel branĉoj de Jesuo Kristo estas jenaj: Resti en Li (versiklo 4): Kiel ordinara branĉo devas

resti en la planto por travivi, ni ankaŭ devas resti en Jesuo Kristo. Se ni ne restas en Li, ni estas kiel elĵetita branĉo kiu baldaŭ sekiĝos kaj fariĝos fajro-ligno. Jesuo Kristo diris malkaŝe “....sen Mi vi nenion povas fari” (versiklo 5b). Ĉu vi estas en Kristo?

Produkti frukton el la vinberarbo (versikloj 2, 4, 5, 6): Kristanoj devas produkti fruktojn el Jesuo Kristo. Ili ne devas produkti la fruktojn el si mem, sed el Jesuo Kristo. La fruktoj, kiujn ili devas produkti, implikas la Dian vivon (Mat 7:16–20), kaj la virtojn de karaktero (Gal 5:22–23, Efe 5:9, Fil 1:11).

Produkti multe da fruktoj (versikloj 2, 8): Ni ne devas nur produkti frukton, sed produkti multe da frukto. Tial Jesuo Kristo purigos nin por produkti multe da fruktoj — fruktoj kiuj daŭros.

Konsekvenco de produktado de fruktoj

(versikloj 2, 7)

Jesuo Kristo promesis du aferojn por tiuj kiuj restas en Li kaj produktas fruktojn por Li. La du aferoj estas jene:

1– *Kreskado* (versiklo 2): Li promesis purigi tiun kiu produktas fruktojn por Li. En Palestino ĉiujare kultivistoj purigas siajn vinberarbojn. Ili forprenas la mortintan lignon, kaj tondetas la vivantajn branĉojn por ke ilia produkto estu pli granda. Same, Dio beligas ĉiun fruktodonan kredanton por igi lin/ŝin kreski en la kredo.

2– *Respondo al Preĝo* (versiklo 7): Se iu restas en Jesuo Kristo, liaj/ŝiaj preĝoj estos responditaj (vidu: Sen 28:9). Dio estas preta fari ion ajn kion

li/ŝi deziras, kondiĉe ke ĝi estas laŭ la volo de Dio (Joh 14:13, 1 Joh 3:21–22; 5:14–15), kaj donos gloron al Dio (vidu: versiklo 8).

Mi estas la vinberarbo; vi estas la branĉoj; kiu restadas en mi, kaj mi en li, tiu donas multe da frukto; ĉar sen mi vi nenion povas fari. Se iu ne restas en mi, tiu estas elĵetita, kiel la branĉo, kaj sekiĝas; kaj oni ilin kolektas kaj ĵetas en fajron, kaj ili brulas. Se vi restadas en mi, kaj miaj vortoj restadas en vi, petu kion ajn vi volos, kaj tio estos farita por vi. En tio mia Patro estas glorata, ke vi donas multe da frukto; kaj vi estos miaj disĉiploj.

Joh 15:5-8

Konkludo

Jen la fino de studo de la granda “MI ESTAS—diraĵoj” de nia Sinjoro Jesuo Kristo en La Evangelio laŭ Sankta Johano. Ĉu vi lernis novajn lecionojn? Ĉu vi reale kredas ke Jesuo Kristo estas la “MI ESTAS, KIU ESTAS” kiu parolis al Moseo sur la Ĥoreb monto? Ĉu vi akceptis Lin kiel vian Vivantan Panon — la ununuran fonton de kontentigo de spirita malsato? Ĉu Lia lumo brilas tra vi? Ĉu vi faris Lin via Pordo al provizo, protekto kaj savo? Ĉu vin konas Li kiel unu el Liaj ŝafoj? Ĉu vi akceptis Lin kiel vian ununuran veran vivantan Vojon al Dio? Ĉu vi produktas frukton por Li? Ne vane havu ĉi tiun studon. Lasu ĝin havi neforigeblan influon en via vivo! ☞

La Evangelio Greka laŭ Tomaso

tradukis el la Greka: Gerrit BERVELING, NL

En la frua kristanismo, krom la poste kanonizitaj kvar de la Biblio, ekzistis multaj evangelioj. Tiuj apokrifaj tekstoj estis grandparte verkitaj en la Greka, sed foje ankaŭ en aliaj lingvoj. Ofte ili pereis dum la paso de la tempo, sed kelkaj postrestas al ni. Multaj atestas pri riĉa fantazio de piaj kristanoj, kiuj iel ne estis tute kontentigataj de l' malriĉaj informoj pri Jesuo, kiujn ni trovas en la kanonaj tekstoj. La pia fantazio ja estis bunta. El tiuj apokrifaj evangelioj, kelkaj jam aperis pli frue en Esperanto: *La Evangelio laŭ Petro*, *La Evangelio Kopta laŭ Tomaso* (tuta serio da nuraj citaĵoj: Jesuo diris: ...), *La Evangelio laŭ Maria Magdalena*, *La Praevangelio laŭ Jakobo*. Nun aldoniĝas nova perleto al ĉi koliero de pia fantazio...

- 1** 1 Mi, Tomaso Izraelido, opinias necesa diskonigi al ĉiuj fratoj el la ĝojoj pri la infanaĝo kaj pri la grandaj faroj de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiujn li faris depost sia naskiĝo en nia lando. Ties komenciĝo estis jena:
- 2** 1 Tiu ĉi infano Jesuo, kiam li estis kvinjara, foje estis ludanta en fluejo de rivereto, post pluvado, kaj la fluantan akvon li kolektis en putetojn kaj tie li tuj faris ĝin klarega, kaj li regis ĝin per sia nura parolo. 2 Kaj farinte el ĝi molan argil-amason, li muldis dek du paserojn. Estis sabato kiam tion li faris. Kaj multaj aliaj infanoj kunludis kun li. 3 Kiam iu Judo vidis, kion ludas Jesuo sabate, li forrapidis por rakonti tion al lia patro Jozefo: “Jen via infano estas ĉe la rivereto, kaj el argilo li faris dek du paserojn, kaj tiamaniere li profanis la sabaton.” 4 Jozefo iris tien kaj kiam li ekvidis lin, li vokis al li: “Kial vi faras sabate, kion fari vi ne rajtas?” Jesuo kunfrapis la manojn, kaj vokis al la paseroj: “For!”, kaj la paseroj flugis for, pepante. 5 Kiam la Judoj tion vidis, ili miris, kaj forirante ili rakontis al siaj gvidantoj kion faris Jesuo antaŭ iliaj okuloj.
- 3** 1 La filo de Anas la skribisto staris tie ĉe Jesuo. Li prenis salikbranĉeton kaj per ĝi li elfluigis la akvon, kiun kolektis Jesuo. 2 Kiam Jesuo tion vidis okazi, li ekkoleris kaj diris: “Fi! Malpia kaj stulta! Kion malbonan kaŭzis al vi tiuj putetoj kaj tiu akvo? Jen nun vi sekiĝos, kvazaŭ arbo sen folioj, sen radiko aŭ fruktoj.” 3 Kaj tuj la knabo komplete elsekiĝis. Jesuo foriris kaj atingis la domon de Jozefo. La gepatroj de la sekiĝinta knabo forportis lin, prilamentante lian junecon, kaj ili portis lin al Jozefo kaj riproĉis lin: “Ke tian infanon vi havas, kiu tiajn aferojn faras!”

- 4** 1 Alian fojon li iris tra la vilaĝo. Knabeto alkuris kaj kunpuŝiĝis kun lia ŝultro. Incitite Jesuo diris al li: “Vi ne daŭrigos la vojon!” Tuj li falis, mortinta. Kelkaj kiuj tion vidis, diris: “De kie devenas ĉi infano, ke ĉiu lia parolo tuj fariĝas fakto?”
- 2 Kiam la gepatroj de la mortinta knabo venis al Jozefo, ili riproĉe diris al li: “Vi ne plu povas loĝi en ĉi vilaĝo kun ni, ĉar tian infanon vi havas. Aŭ vi devos instrui al li beni kaj ne plu malbeni. Ĉar li mortigas niajn infanojn.”
- 5** 1 Kaj Jozefo flanken vokis la infanon al si kaj admonis lin: “Kial vi faras tiajn aferojn, ke la homoj per tio suferas kaj ke ili malamas kaj persekutas nin?” Jesuo respondis: “Mi scias ke tiuj viaj diroj ne estas la viaj; pro respekto al vi, mi do silentos. Sed la aliaj ricevos sian punon.” Kaj tuj blindiĝis tiuj, kiuj malbondiris pri li. 2 Kiuj tion vidis, ektimis terure kaj ne sciis kion fari. Kaj ili diris pri li, ke kion ajn li diras, ĉu bone ĉu malbone, tuj fariĝas fakto kaj montriĝas miraklo. Konsci-iĝinte, ke tion faris Jesuo, Jozefo prenis lin je la orelo kaj forte ĝin pinĉis. 3 Sed la knabo koleriĝis kaj diris al li: “Sufiĉas por vi nur serĉi kaj ne trovi. Vi ja agis treege nesaĝe! Ĉu vi ne scias, ke mi estas la via? Do ne dolorigu min.”
- 6** 1 Certa rabeno¹, laŭnome Zakĥeo, staris en <apuda> ĉambro², kaj kiam li aŭdis ke Jesuo tion diras al la patro, li tre miris, ke, kiel nura infano, li diras tiaĵojn. 2 Kelkajn tagojn pli poste li sin turnis al Jozefo kaj diris al li: “Vi havas inteligentan knabeton: li saĝas. Konfidu lin al mi, por ke li lernu la literojn, kaj mi instruos al li krom la literoj ĉiun scion, ankaŭ, kiel oni salutu ĉiujn pliaĝulojn, kaj kiel oni honoru ilin kvazaŭ antaŭulojn kaj patrojn, kaj kiel oni amu la samaĝulojn.” 3 Kaj li klarigis al li tre sindone kaj klare ĉiujn literojn, ekde la Alfa ĝis la Omega³. Sed Jesuo tre fiksrigardis al rabeno Zakĥeo, kaj diris al li: “Vi ne konas la Alfa-n laŭ ties naturo; kiel do la Beta-n vi instru al aliaj? Hipokritulo! Unue klarigu la Alfa-n, se tion vi povas, kaj nur post tio ni kredos vin rilate la Beta-n.” Kaj tiam li komencis pridemandadi la instruiston pri la unua litero, sed tiu ne kapablis respondi al li. 4 Dum multaj aŭskultis, li diris al Zakĥeo: “Aŭskultu, instruisto, pri la konstruo de la unua baza litero, kaj rimarku, kiel ĝi posedas trajtojn kaj mezan streketon, kiuj – kiel vidate – kune dis-kruras, kuniĝas, altiĝas, dancas, (...). Tri specojn de trajtoj havas la Alfa: homogenajn, hiparĥontajn kaj isometrajn⁴.”

7 1 Kiam la instruisto Zakĥeo aŭdis, ke la knabo eldiras tiajn kaj tiel profundajn alegoriojn pri la unua litero, li ne plu sciis kion respondi al tio pro lia granda erudicio. Kaj li diris al la ĉeestantoj: “Ho ve! Kompatinda mi! Mi ne scias kion diri. Mi altiris ĉi honton al mi mem, kiam ĉi knabeton mi alproksimigis al mi. 2 Reprenu lin do, frato Jozefo, mi petas vin. Mi ne eltenas la forton de lia rigardo. Mi ne en unu fojo travidas, kion li diras. Tiu knabeto ne devenas el la tero: li eĉ mastras la fajron! Eble li estis naskita antaŭ la kreo de la kosmo. Kia ventro portis lin, kia utero kreskigis lin: mi ne scias ! Ve ! Karulo, mi perdas la saĝon : mi ne povas sekvi lian intelekton. Mi trompiĝis, trioble kompatinda mi! Mi klopodis por ricevi lernanton, kaj montriĝas havi instruiston. 3 Mi bone konscias, amikoj, pri mia honto: estante maljuna, mi estis venkita de knabeto. Mi senkuraĝiĝas, mi mortas pro ĉi knabo. Ĉar en ĉi momento mi ne kapablas rigardi en lian vizaĝon. Kaj se ĉiuj diros, ke knabeto min venkis, kion mi povos diri? Kaj kiel mi klarigu, kion li rakontis pri la traboj de la baza unua litero? Mi ne scias, amikoj. Ĉar mi ne konas la devenon kaj la destinon de li⁵. 4 Tial, frato Jozefo, mi petas vin: reprenu lin en vian domon. Ĉar ĉi tiu estas granda, ĉu Dio ĉu anĝelo aŭ mi ne scias kiel nomi lin.”

8 1 Dum la Judoj konsiladis al Zakĥeo, la knabeto laŭte ridis kaj diris: “Nun viaj aĵoj fruktigu, kaj la kore blindaj rigardu. Mi ĉeestas de supre, por ke mi malbenu ilin kaj voku ilin al la alto, kiel estis ordonite de Tiu, kiu min sendis pro vi.” 2 Kiam la knabeto ĉesis paroli, tuj ĉiuj sin sentis savitaj kiuj falis sub lia malbeno. Kaj neniu plu kuraĝis ĝeni lin, por ne esti malbenata aŭ esti handikapita⁶.

9 1 Kelkajn tagojn pli poste Jesuo ludis en iu domo en supra etaĝo, kaj unu el la knabetoj kiuj ludis kun li, falis malsupren, kaj mortis. Kaj ĉiuj aliaj knabetoj fuĝis, kiam tion ili vidis; nur Jesuo restis. 2 Kiam la gepatroj de la mortinta knabo venis, ili vokis lin. [Sed Jesuo diris: “Mi ne ĵetis lin malsupren.”] Sed ili minacis lin. 3 Tiam Jesuo saltis suben el la supra etaĝo, surteriĝis apud la kapo⁷ de la knabeto, kaj laŭtege kriis al li: “Zenon – ĉar tio estis lia nomo – mi diras vin: stariĝu! Kaj diru, ĉu mi ĵetis vin malsupren.” Kaj leviĝinte li tuj diris: “Ne, Sinjoro, vi ne ĵetis min malsupren, sed vi restarigis min.” Kiuj tion vidis, estis perpleksaj. La gepatroj de la knabeto laŭdis Dion pro la signo, kiuj okazis, kaj ili adorkliniĝis antaŭ Jesuo.

10 1 Kelkajn tagojn pli poste iu junulo en la najbareco fendis lignon. Lia hakilo falis kaj disfendis la bazon de l’ piedo. Li perdis tiom da sango ke li mortis. 2 Fariĝis homamasiĝo kaj ega bruado, kaj

ankaŭ la knabeto Jesuo tien iris. Perforte li faris al si vojon tra la amaso, kaj kaptis la vunditan piedon de la junulo, kaj tuj li saniĝis. Li diris al la junulo: “Nun stariĝu, kaj plu fendu la lignon, kaj memoru min.” Kaj la amaso, kiu vidis tion okazi, adorkliniĝis antaŭ la knabeto, dirante: “Vere, la spirito de Dio loĝas en ĉi knabeto.”

- 11** 1 Kiam li estis sesjara, lia patrino lin sendis ĉerpi akvon kaj porti ĝin hejmen. Ŝi donis al li por tio kruĉon. Sed li koliziis <kontraŭ iu> en la amaso, kaj la kruĉo rompiĝis. 2 Jesuo etendis la mantelon, kiun li surhavis, plenigis ĝin per akvo kaj portis tion al sia patrino. Kiam la patrino vidis la signon kiu okazis, ŝi kisis lin, kaj ŝi konservis en si la misteron kiun ŝi vidis lin plenumi.
- 12** 1 Alian fojon, kiam estis tempo semi, la knabeto eliris kun sia patro por semi tritikon sur la propran terenon. Kaj dum semis la patro, ankaŭ la knabeto Jesuo semis unu kernon da tritiko. Ĉe la rikolto kaj la draŝado li kolektis 100 kor-ojn⁸. Li kunvokis ĉiujn malriĉulojn de la vilaĝo al la draŝejo, kaj donacis al ili la tritikon. Kaj Jozefo ricevis kio restis el la tritiko. Li aĝis 8 jarojn, kiam ĉi signon li faris.
- 13** 1 Lia patro estis ĉarpentisto, kaj en tiu tempo li faradis plugilojn kaj jugojn. Iu riĉulo foje mendis ĉe li liton⁹. Ĉar unu el la traboj estis malpli longa ol la alia, kaj Jozefo ne sciis kion fari, la knabeto Jesuo diris al sia patro: “Kuŝigu ambaŭ lignopecojn, kaj ekde la mezo egaligu ilin”. 2 Jozefo agis laŭ la ordono de la knabeto: Jesuo ekstaris ĉe unu flanko kaj ekprenis la malpli longan lignaĵon; li ektiris ĝin kaj faris ĝin egala al la alia. Kaj lia patro Jozefo vidis tion kaj miris; li brakumis la knabeton, kisis lin kaj diris: “Feliĉa mi estas, ĉar ĉi knabeton donis al mi Dio”.
- 14** 1 Ĉar Jozefo vidis la inteligenton kaj la aĝon de la knabeto, ke ili ekfloras, li denove pripensadis ke li ne restu analfabeto; li do kunprenis lin kun si kaj konfidis lin al alia instruisto. La instruisto diris al Jozefo: “Unue mi instruos al li la Grekan, kaj poste la Hebrean”. La instruisto ja bone konsciis la kapablojn de la knabeto, kaj timis lin. Li do skribis la alfabeton kaj ekzercigis lin pri ĝi dum longa tempo, sed Jesuo ne respondis al li. 2 Fine Jesuo diris al li: “Se vi vere estas instruisto, kaj se vi vere scias la literojn, diru do al mi kio estas la forto de l’ *Alfa*, kaj tiam mi respondos al vi pri la *Beta*. Iritiĝinte, la instruisto frapis lin je la kapo. Kiam la knabeto sentis la doloron, li malbenis lin, kaj tuj li svenis kaj falis vizaĝalteren. 3 La knabeto reiris al la domo de Jozefo. Kaj Jozefo tre maltrankviliĝis, kaj petis lian patrinon ne plu lasi Jesuon eksteren, ĉar ĉiuj, kiuj iel vekis lian koleron, mortis.

15 1 Iom pli poste, ree alia edukisto, intima amiko de Jozefo, diris al li: “Konduku la knabeton al mia lernejo; eble mi povos instrui al li la literojn kun afableco”. Jozefo diris: “Se vi kuraĝas, frato, kunprenu lin do kun vi”. Li kunprenis lin, sufiĉe timplene kaj antaŭzorgeme, sed la knabeto kunvojaĝis plej plezure. 2 Kuraĝe li eniris la lernejon, kaj trovis tie libron kuŝanta sur pupitro. Li ekprenis ĝin kaj eĉ ne legante la literojn en ĝi, li malfermis la buŝon kaj parolis en sankta spirito. Kaj li instruis la ĉeestantojn, kiuj aŭdis lin, pri la Torao. Granda amaso kuniĝis por ĉirkaŭstarante aŭskulti lin, kaj ili miris pri la beleco de lia instruo kaj la trafeco de liaj argumentoj, ĉar tion li diris, ankoraŭ estante tre juna. 3 Kiam tion aŭdis Jozefo, li tre ektimis, kaj kuris al la lernejo, konsiderante ĉu ne ankaŭ tiu edukisto [fariĝos kripla]. Sed la edukisto diris al Jozefo: “Vi sciu, frato, ke mi ja akceptis ĉi knabeton kiel lernanton, sed li jam estas plena je graco kaj saĝo; por la estonto, mi petas vin, frato, kunprenu lin al via hejmo”. 4 Kiam tion aŭdis la knabeto, li tuj alridetis lin kaj diris: “Ĉar vi prave kaj ĝuste atestis, dank’ al vi resaniĝos tiu, kiu estis punita”. Kaj tuj saniĝis la alia edukisto. Sed Jozefo kunprenis la knabeton kun si hejmen.

16 1 Alian fojon Jozefo sendis sian filon Jakobo por kunligi lignaĵojn kaj porti hejmen; akompanis lin ankaŭ la knabeto [Jesuo]. Dum Jakobo kolektis branĉetaron, vipuro mordis la brakon de Jakobo. 2 Kiam elstreĉiĝinte surtere li estis mortanta, Jesuo alpaŝis kaj plenklovis la vundon; tuj malaperis la doloro, kaj la besto krevis. Jakobo estis komplete sanigita.

17 1 Poste en la najbaraĵo de Jozefo mortis knabeto malsana, kaj ege ploris lia patrino. Aŭdis Jesuo, kiel granda estas tiu ĉagreno kaj tiu bruo, kaj li tien kuris. Li trovis la knabeton mortinta, ektuŝis lian bruston kaj diris: “Al vi mi diras, etulo: ne mortu sed saniĝu, kaj restu ĉe via patrino”. Kaj tuj li ekrigardis kaj ridis. Al la sinjorino li diris: “Prenu lin, kaj donu lakton al li, kaj memoru pri mi”. 2 La ĉirkaŭa amaso vidis tion, miris kaj reagis: “Vere, ĉi knabeto estas Dio aŭ anĝelo de Dio, ĉar ĉiu parolo lia fariĝas realaĵo”. Jesuo foriris de tie, kaj ekludis kun aliaj infanoj.

18 1 Iom pli poste, dum konstruiĝis iu domo, fariĝis grandega bruo. Jesuo stariĝis kaj tien iris. Vidante kuŝi viron mortintan, li prenis ties manon kaj diris: “Al vi mi diras, sinjoro: ekstaru, kaj plenumu vian laboron”. Tuj li stariĝis, kaj adorkliniĝis antaŭ li. 2 La amaso tion vidis kun granda miro kaj diris: “Tiu ĉi infano estas ĉiela; ĉar multajn animojn li savis de la morto, kaj li savos multajn aliajn dum tuta la vivo”.

19 1 Kiam li estis dekdujara, liaj gepatroj vojaĝis laŭkutime al Jerusalemo por la Paska festo kune kun sia karavano. Kaj post Pasko ili reiris hejmen. Sed ĝuste kiam ili foriris returnen, la knabo Jesuo ree iris al Jerusalemo; liaj gepatroj supozis lin esti en la karavano. 2 Post vojaĝado de tuttaga distanco, ili lin serĉis inter la parencoj, kaj kiam tie ili ne trovis lin, ili tristiĝis kaj reiris al la urbo por serĉi lin. Post la tria tago ili trovis lin en la templo, kie li sidis meze de la instruistoj kaj aŭskultis ilin kaj starigadis demandojn. Ĉiuj atentis pri li kaj miris, kiel tiel juna knabo povas mutigi la pliaĝulojn kaj la instruistojn de la popolo, klarigante la ĉefajn punktojn de la Torao kaj la parabolojn de la profetoj. 3 Lia patrino Maria aliris al li kaj diris: “Kial tion vi faris, infano? Jen ĉagrene ni serĉadis vin”. Jesuo diris al ili: “Kial vi serĉis min? Ĉu vi ne scias, ke mi devas esti ĉe la aferoj de mia Patro?” 4 La skribistoj kaj la fariseoj diris: “Ĉu vi estas la patrino de ĉi knabo?” Ŝi respondis: “Jes”. Ili diris al ŝi: “Benata vi estas inter la virinoj, ĉar Dio benis la frukton de via ventro; ĉar tian honoron kaj tian virton kaj saĝon neniam ni ĉu vidis ĉu aŭdis”. 5 Jesuo stariĝis kaj sekvis la patriron, kaj li restis obea al siaj gepatroj. Lia patrino memortenis ĉion okazintan. Jesuo kreskis en saĝo, aĝo kaj gracio. Al li la honoron por la eterno. Amen.

Rimarkoj

- 1 Laŭ la rakonta kunteksto devas temi pri rabeno, sed la Greka teksto (kiu ja plurloke montras nescion pri tipe Judaj aferoj) uzas la vorton καθηγητής (nia kategeto) kiu signifas edukanto, instruisto aŭ simile.
- 2 Traduko ne tute certa.
- 3 Respektive la unua kaj lasta literoj de la Greka alfabeto. Kvazaŭ la Judoj nur uzus tiun skribon. La Beta estas la dua litero. En *Apokalipso* 1:8 ni legas: “Mi estas la Alfa kaj la Omega, diras la Sinjoro Dio, kiu estas kaj kiu estis kaj kiu estos, la ĉioreganto.” Jesuo ĉi tie do, ŝajne, riproĉas al la instruisto, ke tiu ne konas ĉi Kredkonfeson de l’ frua Kristanismo.
- 4 Supozeble la teksto estas difektita. Kelkaj fakuloj supozas, ke krom aludoj al Gnostikaj sekretaj instruoj enestas – iom post iom ĉe rekopiado miskomprenitaj – aludoj al la formo de la Hebrea litero Alef.
- 5 Deveno kaj destino – vortludo kun Origino kaj Fino – t.e. la Alfa kaj la Omega.
- 6 Aŭ: blinda.
- 7 Laŭlitere: apud la buŝo.
- 8 36400 litrojn.
- 9 Por iom montri la stilon de l’ originalo: tute laŭlitere la frazo jene legiĝas: Estis mendita al li lito, flanke de iu riĉulo por ke li faru por li. Laŭ la Araba evangelio pri la Junaĝo de Jesuo, la koncerna riĉulo estis “la Reĝo de Jerusalemo”.

Informoj

Nova adreso:

Siegfried Krüger, nia kasisto kaj estrarano, salutas kaj informas ke lia nova adreso estas

Siegfried Krüger
Claudiusweg 10,
DE-74074 Heilbronn
Tel/Fax +49 (0) 7131-162688,
E-Mail slkrueger@gmx.de

Du anoncoj de la sekretario:

1 - La sekretario petas tiujn membrojn kiuj partoprenos tiun ĉi jaron en la Universala Kongreso en Florenco, ke ili informu la sekretarion Els.

2 - La sekretario petas la landajn reprezentantojn kaj sekciojn, ke ili sendu mallongan raporton al ŝi.

Mi devas prepari la jarraporton kaj la membroj certe interesiĝos pri la vivo de la KELI-anoj loĝante en multaj landoj en kaj ekster Eŭropo.
(vidu la adreson sur paĝo 2)

kore salutas, Els

Kara amiko en Kristo,

Vian adreson mi trovis en la adresaro de KELI kaj ŝatus rilati kun vi por unue kriste saluti vin kaj korespondi kun vi por la antaŭenigo de la evangelio de Kristo en foraj vilaĝoj en mia lando TOGO.

Mi estas evangelisto kiu havas la taskon, ordonon iri en la vilaĝojn por propagandi la parolojn de Dio, konigi nian Savanton Kristo, dissendi broŝurojn, faldfoliojn pri Kristo, moralan kaj financon subtenon al la malriĉuloj vivantaj en la kamparoj kaj fine havigi al ili kelkajn jam uzitajn vestaĵojn ĉar mia spirita donaco, kiun Dio ofertis al mi, estas la helpa administrado.

Por plenumi tiun taskon dian, mi bezonas ĉies helpon ĉar mankas ofte la broŝuroj kaj informpaperoj pri Kristo kaj precipe veturrimedoj.


Esperante, ke mi ne lanĉas ŝtonon en la maron, mi atendas vian baldaŭan reason kiu helpos min venigi multajn personojn al Dio, kial ne ankaŭ per la lingvo Esperanto.

Plejestime via, Ayaw HUPATI <louispasteuriz@yahoo.fr>
Studenta Evangelia Pastoro en la
“VICTORY INTERNATIONAL SCHOOL EN LOME”;
HUPATI AYAW, 11 BP 48 LOME TOGO, CEL 907-17-20



Wim KOOPMANS

1918 - 2006



La 9-an de februaro forpasis **Wim KOOPMANS**, multjara membro de K.E.L.I./K.U.N.E., de Esperanto Nederland kaj de NoSoBo (vid-handikapuloj kaj blindaj esperantistoj). Li naskiĝis la 28-an de septembro 1918 en Hilversum, Nederlando. En la jaro 1950 li edziĝis. Multaj personoj certe rememoras lian edzinon Jelly Koopmans-Schotanus, kiu forpasis en 1998.

La kvar infanoj fariĝis denaskaj esperantistoj. Li estis sincera, profunda kredanta kristano, konvinkita esperantisto, vegetarano kaj modesta apoganto de kontraŭ-armilaj organizoj. Li estis instruisto, lernejestro kaj laste en Leiden li instruis infanojn kun lernigaj problemoj. Wim estis aktiva en politikaj partioj kiuj havas socialismon kaj pacifismon en la programo. Iom post iom li perdis sian vidpovon kaj ankaŭ la koro pli kaj pli malsaniĝis. Li mortis en vegetarana malsanulejo kie li loĝis dum 12 jaroj.

Sur la anoncilo mi legis la tekston *“Li estis plena de idealoj, viro kiun inspiris lia kredo”*.


La 18-an de februaro kelke da esperantistoj rememoris lin en preĝeja diservo kun la familianoj kaj multaj geamikoj kaj gekonatuloj. Nepoj rakontis pri siaj spertoj kun la avo. Dum la diservo ni kantis kanton kun la belaj vortoj: *“Tiam ni iros tien, kie ankoraŭ mankas vojoj; paco estas la vojo kiu donas direkton al miaj piedoj”* (teksto de la nederlanda poeto Huub Oosterhuis).

Dum kvardek jaroj Wim subtenis la porblindulajn projektojn de Fondaĵo Evidente kaj aliajn bonajn celojn. Ĝis la lasta momento li intencis vivi por aliaj homoj kaj li disponigis sian korpon serve al la medicina scienco. La infanoj petis donaci monon al Fondaĵo Evidente anstataŭ floroj.


Ni kondolencas la familianojn .

Els van Dijk-Kuperus


Multaj la radioj




1. Mul-taj la ra-di-oj, u-nu la lum'.
2. Bran-ĉoj kres-kas mul-taj el u-nu trunk'.



Ni - a lu - mo: Kris - to.____
Ni - a trun - ko: Kris - to.____



Mul-taj la ra-di-oj, u-nu la lum'.
Bran-ĉoj kres-kas mul-taj el u-nu trunk'.



Li nin fa - ras u - nu.____
Li nin fa - ras u - nu.____

3. Donoj estas multaj, nur unu am'.
Amon donas Kristo.
Donoj estas multaj, nur unu am',
Li nin faras unu.
4. Servojn vekas multajn unu spirit',
la spirit' de Kristo.
Servojn vekas multajn unu spirit',
Li nin faras unu.
5. Membroj estas multaj, nur unu korp':
l' eklezi' de Kristo.
Membroj estas multaj, nur unu korp',
Li nin faras unu.

LÄGORNA ÄR MÅNGA • SPB 61 • M: © Olle Widestrand, Jönköping, 1974 • sveda T: Anders Frostenson (1972) 1974, © AF Foundation Hymns and Songs, Verbum, Stockholm • E: Adolf Burkhardt 1986/2000

Anders Frostenson mortis, 99-jara, je la komenco de februaro ĉi-jare. Li estis ege produktiva kiel tradukisto kaj verkisto reprezentita en la sveda himnaro per 146 psalmoj. Ankaŭ eksterlande li estis bone konata. En ADORU 2 himnoj portas lian nomon, ambaŭ tradukita de Adolf Burkhardt, nome 537 kaj 603. Li opiniis ke ni necesas psalmojn kaj kantojn en kiuj ni rekonas nin mem, nian situacion, niajn problemojn, kaj tiuj poste donas al ni sencoplenajn modelojn al nia vivo.